

## Raporto por la Terminologia Komisiono de UEA

Terminologia Somera Kurso en Vieno ekde la 14-18 de julio 2014

Estis granda surprizo por mi tiu ĉi kurso, kaj sendube plezuro! Mi multe dankas al tiuj kiuj ebligis mian partoprenon, kaj tre speciale al Mélanie Maradan pro ŝia instigo kaj fido ekde la jaro 2012 por lerni pri tiu mirinda fako kaj kiel evoluigi ĝin ene de nia movado, por antaŭenigi Esperanton. Mi ne povis imagi kiel profunda interrilatiĝo ekzistas inter mia studfako kaj Terminologio, kio multe ĝojigas min, ĉar dank'al tio mi nun havas pli konkretan bildon pri kiel prepari terminologian projekton por la Terminologia Komisiono de UEA kaj por mia diplomiĝa universitata laboro, ambaŭ celojn mi volis atingi, kaj tio realiĝis per tiu ĉi ebleco.

Mi povis konstati ke, ĉefe partoprenis homoj kiuj jam havas spertojn kiel tradukistoj aŭ fakuloj pri tradukado kaj kiel organizi terminologiajn sistemojn pere de datumbazoj kiel TBX, estis 78 partoprenantoj el 27 landoj, inter ili tre spertaj universitataj instruistoj pri lingvoj, teknologio, terminologiaj studoj, komunikado, interaliaj.

Kiel ĉeftemo estis traktita la Terminologia Manaĝado, en kies kadro troviĝas pluraj aspektoj kiuj devas esti priatentitaj antaŭ prezenti Terminologiajn Projektojn, kiel ekzemple monsubtenantoj, planado de la projekto, elspezoj kaj profitoj. Krome, gravas prilabori metadatumojn, lingvo-politikojn, normigadon, pere de teama laboro kie evidentiĝu motivigoj, eblecoj, maleblecoj, flanke de la fakuloj por alveni al pozitivaj rezultoj. Kial bezonatas atenti la terminologian laboron ankaŭ ene de la esperanta komunumo? Precipe ĉar tio signifas evolui kiel asocio je internacia nivelo, diskonigi kaj evoluigi nian lingvon: Esperanto, profesia komunikado je supera nivelo. La agado pere de Terminologiaj Programoj por traduki aŭ interŝanĝi datumojn helpas nian organizon havi la informojn ordigitajn kaj klasifitajn por kompreni kial kaj por kio la organizo produktas tiujn informojn, kaj kiu (j) produktas ĝin. Pere de tiu agado eblas ankaŭ pli bone kompreni la programojn kaj adapti ilin al bezonoj de nia organizo. Terminologia laboro devas baziĝi en kolektado, priskribado kaj ofta enprocezigo, ĝi plifaciligas la laboron al aliaj fakuloj, t.e. malpli da tempo kaj bonaj rezultoj.

Reakirado de informoj ĉiam estas tikla temo en ĉiuj organizoj, pro tio vere gravas krei kaj konservi laborfluojn pere de kiuj eblu analizi normigitan kaj ne duobligitan terminologian sistemon, tia strategio vere influos en la procezo por reakirado de informoj, ĉiuj devas kompreni la samon ekde ĉiuj vidpunktoj. Gvidi Terminologian Entreprenon, signifas atenti pri bezonoj kiel ekzemple, reklamoj, financaj raportoj, retpaĝoj, kontaktoj. Ne eblas krei novajn konojn sen Terminologio ĉar ĝi signifas ne nur specialecon, sed ankaŭ sciencon, en kiu ne nure gravas terminojn sed ankaŭ la konceptojn kiuj reprezentas tiujn terminojn.

Malfacilas klarigi al homoj la gravecon de Terminologio kaj la profitojn kiujn alportas sia bona kreado kaj uzo por malpliigi la abundajn ĉiutagajn informfluojn kun kiuj organizoj devas labori. Por tio, estas esence havi komunikajn kaj lingvistikajn konojn, fakte ili estas orientitaj al tiuj informfluoj.

Do, ni klopodu terminologie kaj teame labori por daŭre evoluigi ne nur nian lingvon, sed ankaŭ niajn labormanierojn.

Ariadna García Gutiérrez